

N° 188
octobre
novembre
décembre
2019

LA INFORMILO

N° 188
oktobro
novembro
decembro
2019

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2019
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
"Philippe Desforges"

27, rue de la République
FR-54000 NANCY

=====

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €

Centre de *Loisirs d'Art sur Meurthe*



Le traditionnel stage de printemps d'Espéranto France-Est se déroulera cette année à Art-sur-Meurthe, à une dizaine de kilomètres de Nancy. Cours pour débutants, cours de conversation et séminaire littéraire. Concert de la jeune chanteuse et guitariste italienne Kjara Raggi, qui chantera en Espéranto et en italien. Renseignements et inscription : <http://esperanto.france.est.free.fr/>

**Ne forgesu aliĝi al nia printempa staĝo,
kiu okazos la 27/29ajn de marto 2020
en Art-sur-Meurthe apud Nancy.
Programo kaj aliĝilo en ĉi-tiu numero.**




**41a BAVELO-Seminario - 86a regiona aŭtuna staĝo
18a - 20a de oktobro 2019 en Lörrach**

Refoje la aŭtuna regiona staĝo kaj samtempe la 41a Bavelo-seminario estis organizita de Bavelo, ĉi-foje tute sude de Germanio proksime al la limoj al Francio kaj Svislando en la landlima urbo Lörrach. La junular-gastejo estas impona konstruaĵo iom aparte de la urbo-centro kaj tute taŭga por akcepti tiun aranĝon. Ankaŭ kunvenis aliaj grupoj. Al ĝi partoprenis pluraj membroj de nia Orienta Federacio kaj tute aparte la libro-servo, kiun Jean-Luc prizorgas. Pro la proksimeco al Francio kaj Svislando iuj tamen preferis ne tranokti surloke.



Jam vendrede vespere okazis la unuaj prelegoj. Luc Allemand el Svislando ege interese rakontis pri sia naŭmonata vojaĝo per biciklo de Svislando al Rusio. Li veturis tra Aŭstrio, Hungario, Turkio, Ukrainio, ĝis Rusio. Survoje li renkontis diversajn homojn, esperantistojn,

Esperanto-grupojn kaj havis interesajn kontaktojn. En Ukrainio li estis intervjuita de loka televid-stacio.




Jen finfine li atingis la vastan landon Rusio, tie li povis kontakti loĝantojn kaj eĉ tranokti ĉe kamparanoj. Ĉie li estis bonvena kaj amike akceptita.





Thomas Bormann estis dum pli ol 5 jaroj ĵurnalista en Turkio por pluraj gazetaraj agentejoj en Germanio. Li rakontis pri sia vivo kaj pri sia laboro tie, sed ĉefe pri la historio kaj la evoluo de tiu lando, kiu troviĝas parte en Eŭropo kaj grandparte en Azio.



André Muller estas germana lingvisto, kaj poligloto, li studas nun en la universitato

de Zuriko en Svislando.

Li vojaĝis al Birmo, kie estas parolataj pluraj lingvoj. Iujn el ili li eĉ iom regas kaj tiel povis konversacii kun diversaj studentoj kaj lokuloj por analizi la prononcojn la skribojn kaj eĉ interkompreniĝi. Interalie li iom parolas jenajn aziajn lingvojn: birma, klingona, ĉina, ginpa, vjetnama, ŝana

Multaj partoprenantoj ĝuis lian prelegon kaj eksciis multajn novajn interesajn aferojn.



Jen masko, kies okuloj kaj langoj daŭre moviĝas.



Sabate posttagmeze post tagmanĝo en piceo, la tuta grupo veturis per buso kaj trajno al Bazelo en Svislando. Feliĉe tiam la pluvo ĉesis kaj eblis sen ombreloj admirari la urbon kaj la imponan pejzaĝon ĉe la Rejno.



Nicole Bérout kaj Annelise Nicolodi gvidis la grupon tra Bazelo.

Trans la Rejno veturas boato sen motoro. Ĝi estas fiksita al kablo super la rivero, kaj dank'al akvoŭfluo ĝi moviĝas.



En la sabat-vespera programo Jean-Luc Thibias prezentis plurajn novajn librojn de nia libro-servo.

Manfred Westermayer klarigis pri la stato kaj la aktualigoj pri la Burunda Projekto, kiun li persone subtenas kun la helpo de pluraj kontribuantoj.

Sekvis tre amuza kvizo pri asurdaĵoj kaj sciindaĵoj.

La vespero pludaŭris en la knajpo.



Dimanĉe matene en la kadro de la bukeda kurso, Thomas Bormann refoje allogis la aŭskultantojn per vere interesa prelego rilate al iama GDR. Fakte ĉefe pri Stasi, la ŝtata sekureca servo en GDR, kies grava celo estis kontroli, observi kaj spioni ĉiujn individuojn de la ŝtato. Estis dungitaj 91.000 oficistoj kaj 189.000 helpantoj.

Ankaŭ la esperantistoj en GDR estis tiel kontrolitaj kaj plenaj dosieroj estis starigitaj. Kiam iuj ricevis leteron el okcidentaj landoj aŭ eĉ el tiama Ĉinio (El Popola Ĉinio) jam necesis suspekti ilin. En la arkivejo en Berlino li sukcesis trovi tutajn dosierojn pri konataj esperantistoj.



Kaŭzo por la lanĉo de la OPK (tiel Stasi mallongigis la terminon "operacia kontrolado de persono") estis, ke Sch (tiel Stasi en tiu ĉi raporto mallongigis la nomon Bert Schumann) kiel gvidanto de Esperanto-grupo flegis rilatojn al NSA (GDR-tipa mallongigo por "nesocialisma eksterlando": "nichtsozialistisches Ausland") kaj ke li intencis distribui alsenditajn presitajn materialojn. Celoj de la OPK estis ekhavi klarecon, kiagrade Sch evoluigas malamikajn negativajn aktivecojn kadre de tiu Esperanto-grupo, kaj preventive garantii, ke de Sch ne eliras danĝeroj por la ŝtata sekureco.

Jen finiĝis tiu alloga kaj tute amika renkontiĝo. Ni kore dankis al la organizantoj, kiuj sukcesis krei ege buntan programon. Jean-Luc jam donis rendevuon por la printempa staĝo en Art-sur-Meurthe, en marto 2020.

Fotoj de Andreo kaj Gerold



NOTRE DAME DE PARIS = Nia Damo de Parizo

Parizo, la 15an de aprilo 2019 post-tagmeze. Subite radio- kaj televid-elsendoj ĉesigis siajn normalajn programojn kaj eksciigis:

Brulas la katedralo: Nia Damo de Parizo!

Ne kredeble! Monumento el la plej famaj de Francio, aĝa je pli ol 800 jaroj, kaj konstante prizorgata! Kiel eblas tio? Iom post iom, la bildoj fariĝas pli teruraj kaj ekploras spektantoj: nun, la tuta ĉarpentaĵo brulas; la sago-turo pleniĝas je flamoj kaj fine falegas, rompante malsuprajn volbojn.



Bildo 1:

Brulas tegmento kaj ĉarpentaĵo, dum ankoraŭ estas tago.



Bildoj 2 & 3:

Fajro-brigadistoj luktas, dum ekploras spektantoj.



La evento estis tiom grava, ke la respublika prezidento S-ro Macron [Makro] rezignis pri sia parolado sam-vespera al la francoj!

Dum la incendio la maltrankviliĝo estis maksimuma, kiam fajro ekatakis la maldekstran (nordan) turon: Se ĝi estus brulinta, eble la tuta fasado estus ruiniĝinta! Nur en la nokto, fajrobrigadistoj povis certigi, ke ili mastrumas l'incendion.



Bildo 4: Subite falegas la centra sago-turo



Bildo 5: Skafaldo ruiniĝinta

Preskaŭ tuj alvenis multaj mesaĝoj, kondolencaj kaj kuraĝigaj de fremdaj landoj: Nia Damo de Parizo estas konata de multaj turistoj kaj tiom fama kiom Eifel-Turo! Ankaŭ rapide alvenis proponoj de mon-helpo por restaŭri la edificon, donacoj de multaj francoj (el kiuj kelkaj riĉeguloj!) sed ankaŭ de nefrancoj. Jam 3 tagojn poste, la sumo de promesitaj donacoj superis 1 miliardon da eŭroj!

Sed antaŭ ĉio necesas analizi la damaĝojn, sekurigi volbojn kaj murojn kaj ankaŭ malmunti la skafaldon. Tiu skafaldo estis muntita supre de la ĉefa navo por renovigi la sago-turon. Tutcerte l'incendio (kun temperaturoj ĝis 800°) malfortikigis ĝian strukturon.

Ĉu eblos rekonstrui saman ĉarpentajon?

Por konstrui la subtegmentejon spertaj ĉarpentistoj uzis multajn trabojn el kverko (pro la nombro de uzitaj arboj, la ĉarpentajon oni nomis *l'arbaro*). Vere impresaj dimensioj: 100m longe, 13 larĝe –super la navo- kaj 10m alte. Ekzistis unua ĉarpentajo super la ĥorejo en la jaroj 1160-1170, sed ĝi malaperis, poste oni starigis la novan de 1220 ĝis 1240, kun forta deklivo (55°): Ĝuste tiu malaperis en aprilo 2019 post preskaŭ 100 jaroj! Tri militoj okazis, kiuj ne atingis ĝin: la franca-prusa milito en 1870/71, la Unua Mondmilito, kiam grandega germana kanono (la fama Grosse Bertha) bombardis Parizon. Poste la Dua Mondmilito, ĉe kies fino Hitler minacis bruligi la tutan urbon.

Ĝenerale dum la Mezepoko tegoloj el kuirita lomo estis uzataj, sed pro la distanco al la provizejo, arkitektoj preferis elekti plumbon kiel kovran materialon: **1326 ladoj el plumbo** dikaj je 5 mm, kiuj pezis pli ol 210 tunojn!



Bildo 6: Tradicia tegmento el plumbaj ladoj. Ĉu ĝi ekzistos plu?

Noto: Tiu artikolo aperos en la venonta numero de **KONSTRUADO-kajero 2020 de la fak-asocio TAKE**. Pliaj artikoloj estas planitaj: **Rekonstruota katedralo: kial ne ĉarpentajo el betono? Pri plumbo en konstruado, pri bano-duŝejoj, ktp**

Ĝin redaktis Pierre Grollemund

Informoj pri TAKE Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

En majo 2019 la fak-asocio TAKE sukcesis akurate eldoni sian revuon **"KONSTRUADO-kajero de TAKE 2019"**, tutkolora kun la temo pavimoj. Ĉiuj niaj membroj ricevis ĝin, krome ni sukcesis ankaŭ ĝin disvendi okaze de diversaj eventoj, renkontiĝoj, kongresoj, kaj al Libro-servoj.

Por la Jaro 2020 multaj temoj estas antaŭviditaj, pri arkitekturo, pri fenestroj, pri rekonstruitaj (aŭ rekonstruotaj) katedraloj. Volonte ni povas akcepti viajn proponojn aŭ eĉ viajn kontribuadojn Bonvolu tiam rilati kun nia sekretario Pierre Grollemund: verdapigo@gmail.com

Ekde 2020 refoje altiĝos la poŝtaj tarifoj en Francio, tiam la kotizo je 8 eŭroj tute ne kompensas la kostojn por presado kaj sendado de nia **"KONSTRUADO-kajero"**. Malgraŭ tio kaj dank'al donacoj, la komitato decidi konservi la samajn kotizojn, la simplan kotizon je 8 eŭroj kaj la subtenan je 20 eŭroj.

Tial ni proponas al vi fariĝi membro de TAKE kaj eventuale eĉ akiri malnovajn ekzemplerojn laŭ la ĉi-suba listo .

La komitato de TAKE



KOTIZOJ AL TAKE	2020	2021	2022
Normala kotizo	8 eŭroj	8 eŭroj	8 eŭroj
Subtena kotizo	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Ĉiuj membroj ricevos en 2020	La KONSTRUADO-kajeron TAKE (ampleksa teknika kajero)		
Eblas mendi antaŭajn numerojn por la jenaj jaroj: Mendo de 1 ekzemplero: 8 eŭroj	Konstruado-kajeroj 2019 2017 2016 Jarkolektoj: 2015 2013 2012 2011 2010 2009 2008 2007 2006		
Pago en Francio	Per ĝiro al TAKE: Poŝt-banko: CCP 2 549 46 A Strasbourg Per sendo de franca ĉeko en eŭroj je la nomo de TAKE-Esperanto, al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM Francio		
Pago Internacie	Internacia ĝiro al TAKE: IBAN: FR58 2004 1010 1502 5494 6A03 650 BIC: PSSTFRPPSTR		

Niaj lokaj grupoj deĵoris por informi pri la lingvo

Festo de la Asocioj

Dimanĉe la 22an de septembro la grupo de Nancio ĉeestis la tagon de la Asocioj en la parko de la Arbidejo en Nancio.

Malgraŭ prognozita pluva vetero la suno kaj la nuboj alternis en la ĉielo. Ĝis la fino de la festo ne pluvis. La vizitantoj ne estis tre nombraj, sed iuj montris ian intereson.



Festi la Vida


Dimanĉe la 29an de septembro 2019 okazis la festivalo pri ekologio "Festi la Vida" en Raon aux Bois. La grupo de Nancy tie prezentis Esperanton kaj pere de ludoj, libroj, diskoj, klarigis la funkciadon de la lingvo kaj informis pri ĝia historio, ĝia literaturo, kaj ĉefe pri ĝia uzado.

Estis surpriziga la nombro da personoj, kiuj haltis ĉe la budo kaj interesiĝis pri Esperanto.



La 29an de septembro okazis Libro-foiro en la Parko de Wessering. Tie volonte deĵoris Roberto por prezenti la lingvon.

Li rakontas, ke estis iom da kontaktoj: Junulino kun sia granda tornistro el Germanio (loĝanta en Stuttgart) interesiĝis pri la Pasporta servo, kiun ŝi eĉ fotis. Roberto konsilis al ŝi rilati kun BAVELO. Alia virino interesiĝis kaj eĉ akiris M11.



En Ungersheim jam tradicie okazas la foiro pri Ekologio kaj Justa Komercado. Ĉi-jare la 16an kaj 17an de novembro. Tie la grupo de Mulhouse-Esperanto sukcesis rezervi tablon. De sabate posttagmeze deĵoris Roberto kaj dimanĉe helpis lin aliaj membroj de la grupo

Samtage okazis en la kulturdomo de Illzach la ege sukcesa festivalo pri bildrakontoj, nomata "Bédéciné" Tamen tie ni jam ne sukcesis proponi deĵoradon.

Ĉiuj membroj de EFE aŭ abonantoj de La Informilo, kies ret-adreso estas konata, troviĝas en la dissendo-listo EFE-informas. Ĝi ebligas akurate informi pri eventoj kaj interŝanĝi informojn inter la membroj: efe-informas@googlegroups.com

Krome eblas ankaŭ konsulti nian retejon <http://esperanto.france.est.free.fr>.

Belinzono en itala Svislando kaj siaj kasteloj


(Teksto: Dietrich Michael Weidmann)

Belinzono, ĉefurbo de Tiĉino kun 43900 loĝantoj estas la dua plej granda urbo de ital-lingva parto de Svislando kaj kun certeco ĝi estas la urbo, kie la tiĉinanoj kun plej granda memkonscio vivas sian ital-lingvan kulturon ne submetante sin al la premo de la germana kaj angla lingvoj. La bildon de la urbo dominas la tri kasteloj de la iamaj koloniaj senjoroj el la interna Svislando.



Belinzono situas sude de Gotardo en la loko, kie la tri gravaj svisaj alpo-pasejoj tra Gotardo, Splugo kaj Lukomagno kuniĝas. Apud Belinzono la valo de Tiĉino mallarĝiĝas, tiel ke per unu sola fortikaĵo eblis kontroli la tri alpo-pasejojn. Tial en la teritorio de la nuntempa Belinzono homoj setlis

jam antaŭ pli ol 4000 jaroj en ta juna ŝton-epoko. En la sesa jarcento post Kristo Belinzono jam ekzistis kiel urbo kun fortikaĵo sub la regado de la langobardoj. Belinzono estis skribe menciita la unuan fojon kiel "ad Biltionem", kiam la langobarda fortikaĵo estis atakita de la Frankoj. En la 14-a kaj 15-a jarcentoj la tiam nove fondita Svisa ŝtato komunumo fariĝis ĉiam pli forta, tial la urbo Milano, kiu posedis Belinzonan, fortigis la fortikaĵon kaj anstataŭigis la lignajn konstruaĵojn per ŝtonaj muroj kaj konstruis la defendo-sistemon konsistantan el la tri kasteloj kaj la defendo-murego. En la jaro 1499 la franca reĝo Ludoviko la 7-a atakis kaj konkeris la urbon kaj en la jaro 1503 per la kontrakto de Askono vendis ĝin sekrete al la ŝtato komunumo. La tri kasteloj de Belinzono ek de tiam servis kiel sidejoj de la ŝtato komunumaj voktoj. Hodiaŭ la belinzonaj kasteloj estas monda heredaĵo de UNESKO.



Post kiam surbaze de la mediacia konstitucio de Napoleono en la jaro 1803 fine et la iama ŝtato komunuma kolonio fariĝis la Kantono kaj Respubliko Tiĉino, Lugano, Lokarno kaj Belinzono alterne funkciis kiel kantona ĉefurbo, ĝis en 1878 Belinzono definitive alprenis tiun-ĉi rolon. En la jaro 1907 estis enkomunigita la iama komunumo Carasso al Belinzono kaj la 2-an de aprilo 2017 la iamaj komunumoj Camorino, Claro, Giubiasco, Gnosca, Gorduno, Gudo, Moleno, Monte Carasso, Pianezzo, Preonzo kaj Leventina. Tiel la loĝantaro de Belinzono kreskis de 19000 al pli ol 40000.


La Esperanto-movado en Belinzono

De post la 7a IFEK-kongreso en Zuriko en Kantono Tiĉino kaj precipe en Belinzono aktivis kantona fervojista grupo kun Kurt Greutert, Giovanni Sasselli, Enea Albertini, Fernando de Faveri kaj aliaj. Tio kondukis al la fondiĝo de Esperanto-Grupo Belinzono kaj de Tiĉina Esperanto-Ligo, kies unua prezidanto estis Enrico Balmelli. Tiuj grupoj ĉesis siajn aktivecojn en la 1990-aj jaroj pro maljuniĝo de la aktivularo kaj malsukceso akiri junajn sekvantojn.



Bildo: Tschubbi, situa mapo de Belinzono (fonto Vikipedio)



Espéranto France-Est http://esperanto.france.est.free.fr.		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>	S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie Vic-prezidanto</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ro Robert KUENY	09.71.31.37.62	kueny.robert@orange.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammbach@gmail.com
	S-ro Hervé KIEFFER	06.21.09.19.98	kiefferherve@gmail.com

Abono al La Informilo →	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Staĝo en Art-sur-Meurthe	15. Staĝo en Art-sur-Meurthe
2. Staĝo en Lörrach	16. Schweidissi, Zaleski Zamenhof
3. Staĝo en Lörrach	17. Abonoj kaj kotizoj
4. Staĝo en Lörrach	18. Enigmoj + anekdotoj
5. Nia Damo de Parizo	19. Enigmoj + anekdotoj
6. Nia Damo de Parizo	20. Libroservo
7. Deĵoradoj de niaj grupoj	21. Libroservo
8. Bellinzona en Ital-lingva Svisio	22. Lando kun 3 oficialaj lingvoj
9. Komitatanoj kaj enhavo	23. Zamenhof-festo Mulhouse
10. Angulo de la prezidanto	24. Zamenhof-festo Mulhouse
11. Avula angulo (sekvo)	25. Mediteranea Esp-Semajno
12. Karl von Frenckel	26. Vojaĝo al Kartvelio
13. Albert Schweitzer	27. Ukrainio + Benino
14. Staĝo en Art-sur-Meurthe	28. Nia foto-paĝo

ISSN 0291 6037 trimestriel
N° CPPAP : 0409 G 83517
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
Esperanto France-Est
MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République
54000 NANCY
Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**
Rédacteur provisoire : André Grossmann
Dépôt légal : **30 septembre 2013**
Imprimé par l'imprimerie Sprenger

ANGULO DE LA PREZIDANTO 188



Karaj gesamideanoj,

Kiam vi legos tiujn liniojn, jam alproksimiĝos la jarfino. Eble vi jam realiĝis al EFE, ESPERANTO-FRANCE, UEA, eble vi jam reabonis LA INFORMILO-n. Se vi tion ankoraŭ ne faris, ne forgesu niajn asociojn. Ĝis nun niaj asocioj pluvivas kvazaŭ ekskluzive per la mono de siaj membroj. Ilia administra laboro estas farata aŭ de bonvolemaj membroj, aŭ de dungitoj, plej ofte de ambaŭ kune. Eble iom post iom ankaŭ aliĝos la centmiloj da lernintoj de la retkursoj por redoni vigecon al nia internacia asocio!

Inter la ĵus cititaj asocioj min ĉagrenas UEA, kiu baldaŭ eĉ estos devigata maldungi salajratojn. Ĉu la nova prezidanto Duncan CHARTERS sukcesos redinamikigi UEA? En intervjuo de Pola Retradio li instigis la membrojn direkti al li siajn ideojn, petojn, ktp.

De pli ol 40 jaroj mi nun membras ĉe UEA kaj mi tiele profitis – ĝis nun - plurajn servojn: la JARLIBRO-n (kiu utilis al mi plurfoje), la legadon de la revuo ESPERANTO, la plezuron partopreni kelkajn universalajn kongresojn kaj la informon pri novaj libroj haveblaj ĉe ties libroservo. Sed mi aliĝis ankaŭ, ĉar mi deziris subteni per mia mona kontribuo la laboron de nia internacia asocio ĉe la internaciaj instancoj (UNO, UNESKO, EU, kaj aliaj). Aliajn postulojn mi ne havis.

Ŝajnas, ke nun la membroj petas pli da servoj, UEA jam realigis ŝajne efikajn trejnseminariojn por aktivuloj, la AMO-seminariojn (AMO = Aktivula Maturigo). Kion plian UEA povas disponigi al la aktivuloj? Mi skribis al Duncan CHARTERS, petante ke UEA listigu kaj enretigu la esperantistajn muzikistojn/kantistojn, teatrajn aktorojn, prelegantojn, kursgvidantojn, kiuj pretas interveni en esperanto-aranĝoj tra la mondo. Jam tio faciligus la laboron de la organizantoj de eventoj priesperantaj. Tian laboron ja povus fari iu ajn aktivulo, sed tia servo farata de UEA estus pli daŭripova.

Eble ankaŭ vi havas ideojn. Ankaŭ vi skribu al UEA, sciante, ke plej probable, en la nuna kriza situacio, multo ne tuj okazos. Sed ni, esperantistoj, ja estas paciencaj kaj elturniĝemaj. Ĉu ne?

E.L.



La kantistino-kantverkistino de Rimini (ankaŭ aŭtorino, gitaristino kaj komponistino) Chiara Raggi prezentos kanzonojn el sia nova verko "Blua Horizonto". Ŝi estas la unua itala kantverkistino uzanta Esperanton.

Finalisto de la Nacia Premio Bianca D'Aponte 2018 dediĉita al la aŭtoro-kanto, ŝi gajnis la Premion Suoni dall'Italia-premio donita al ŝi de Mariella Nava, kiu proponis al ŝi iĝi parto de ŝia diskografia etikedo "Sonoj el Italio".

Blua Horizonto estas la debut-albumo de Chiara (Kjara) Raggi en la muzika scenejo. Kjara elektis Esperanton kiel alian esprimilon de sia muziko, ĉar ŝi estas fascinata de la muzikeco de la lingvo kaj de tio, kion ĝi reprezentas por ŝi: ideo de egaleco kaj unika kaj esprima libereco.

Informis la programisto de la kulturaj aranĝoj en Wintzenheim (Haut-Rhin), kie nia samfederaciano Michel BASSO organizis postsomere koncerton de Kjara en plenplena salono: tiu koncerto estis la plej sukcesa aranĝo de la sezono. Ĝuu ankaŭ vi ŝian arton!

AVULA ANGULOArmand HUBERT ... *alflugas rememoraĵoj*

Septembro 1939. Ekas la Dua Mondmilito.

Mia familio forfuĝis el landlima vilaĝo, piede kaj trajne. La konvojo de elĉerpitaj rifuĝintoj finfine haltis en la urbo Royan, marborda feriejo. "Ĉe l'oceano!"

ĈIELO NUBA-ĈIELO HELA

La responsuloj de la trajno kaj la lokaj aŭtoritatuloj pridiskutis nian alvenon. Montriĝis, ke nia trajno ne atingis la bonan adreson: la urbo Royan atendis urbanojn, el Metz, Loreno. Ne kamparajn povruolojn "kiuj eĉ ne parolas la francan" !

La tono de la interŝanĝoj rapide ŝvelis; temis pri rea hejm-veturado.

Tiam la rifuĝintoj elgrimis la vagonojn; akra ribelado ekis: "Ni ne plu enrajniĝos. Sufiĉas!"

Plie, niaj junuloj soldatiĝas, samkiel la viaj. Ili kontraŭ-staras la malamikon, samkiel la viaj, eĉ ne parolante la francan."

Konsento kaj paciĝo ekregis sur la kajo.

Baldaŭ alvenis taksioj, multnombraj. Aro da veturiloj aperis inter la stacidomo kaj akcepto-preta urbo. La familioj dispartiĝis en restadejoj kaj vakuaj vilaĝoj.

Mia avo kaj lia familio en-hoteliĝis kune kun aliaj parencoj. Mia patrino kaj ŝiaj du infanoj eniris ĉambron. Belan. Tie estis granda, pura lito, kiun la infanoj tuj ekprovis. "Perfektaĵo! Post surpajla dormloko dum kvar noktoj, kiel komfortos ripozo ĉi-nokte!" Sentoj de kontentiĝo kaj feliĉo aperis. Kaj vidu! Ĉe lit-kapo, jen iu diskreta pordo: necesejo! Ĉe lit-piedo, alia diskreta pordo: tualetejo!

Surfalis la patrino grava emocio. Ĉu vere oni nin akceptas respekto-plene? Ĉu rifuĝintoj iĝas nun estimindaj? La virino rapidis en la koridoron. Siajn sentojn ŝi nepre partigu kun fratino, bofratino, kuzino, ...!

REVIĜLIĜO.

Nova vivo organiziĝis en la loĝejo, kie dudeko da geparencoj nun komunecon spertis. Neniam ili partigis tian proksimecon. Onklino Klara, monaĥino, alvenis por prizorgi siajn familianojn. La etoso iĝis varmkora, dum la ĉiutaga mastrumado: partigo de kuir-devigoj, preparo de komunaj manĝoj, purigado... Neniu virino grumblis, nek malaceptis la aŭtoritaton de onklino Klara.

Kaj ni geknaboj estis ŝiaj karuletoj.

Sed la pinto de la gajno en nova viv-fido okazis en preĝejo. La kapelo de knabin-orfejo estas atribuita al rifuĝintoj kiel paroĥejo. La vilaĝanoj trovis lokon, kie eblis unuanime kanti, preĝi, sin trovi en varma etoso. Ĉiu dimanĉo iĝis festo: fervora sindediĉo dum diservo kaj poste, sur la placo, renkontoj kaj troviĝoj uzinte nian regionan lingvon.

La rifuĝintoj en Royan revigliĝis.

JUNULECA DISTRAĴO

Sed tiu "invado" en orfa etoso perturbis la knabinan komunumon.

Arturo, mia kuzo kaj mi, Armando, iĝis enpostenitaj kiel mes-helpantoj. Ĉiam regulaj kaj fidelaj al diservoj semajne kaj dimanĉe. Kvankam nur dekjaraj, ni estis

dignaj kaj kompetentaj servantoj ĉirkaŭ la altaro.

Kvardeko da knabinoj atenteme sekvis nian teatro-ludon en la ĉorejo de la preĝejo. La devigo ĉeesti oftajn diservojn iĝis distraĵo ... kaj eĉ pli.

Paŭlina kaj Mari-Lu, du orfinoj 12-13 jaraĝaj, ĉarmaj eniris la sferon de la du mes-servantoj. Iun dimanĉon, post posttagmeza diservo, la kuzo kaj mi forlasis la vestejon de la kapelo, memkontentaj: Ni ĝuos libertempon ĉe marbordo. Sed malantaŭ la elirpordo, du knabinoj, ekscititaj, ridantaj atendis nin. Ili premis ambileton en niajn manojn kaj forkuris ridante. Disfaldinte sian bileton, Arturo legis: "Mi amas vin, Paŭlina". Sur mia bileto: "Mi amas vin, Mari-Lu". Jen du orfinoj, spite al la kontroloj, pruvis junulecan, sekretan ardon. Ni, du mes-servantoj senvortis. Kiel tia aventuro pluigos? Ĉu ĝi sekrete plu daŭros?

AKRIGO

Sekvantan dimanĉon, post vespera diservo. Arturo kaj mi forlasis la vestejon de la preĝejo, ege malkontentaj. Prave: ni ne ekvidis niajn du fraŭlinojn, nek dum la pasinta semajno, dum matenaj mesoj. Novan afablan signon ni vane atendis. Ĉagrenitaj, ni ekiris hejmen. Sed...Kio en la strateto? nekredblaĵo! La du knabinoj atendis nin en malhelo. Ili ridis pro sia surpriz-farado. Dolĉan bileton disdonendan ili havis, kiel ankaŭ kisetojn. Rapide ili forflugis, daŭre ridantaj. La du eskapintinoj devis trovi la ĝardenan muron, kie atendis eskalo.

En la institucio, atendis ilin ankaŭ la superulino, fratulino Odila, en sia tuta aŭtoritato.

- Nu! De kie venas niaj fraŭlinoj?

- Ni diris "bonan nokton" al niaj karuloj, la du mes-helpantoj.

- Ĉu? Vi do ankaŭ forlasis la domon!

- Jes, ... per eskalo trans la ĝarden-muron.

Fratulino Odila sufoke tondris: "Kion mi aŭdas? Vi foriras sen permeso spitante la regularon. Ambaŭ vi perfidas la fidon de niaj karaj fratulinoj. Vi montras nekredblan senhonton. Vi elektis kulpoplenan, pekan vojon" Fratulino Odila fine silentis. Ŝi sentis sin senhelpa fronte al du knabinoj, kiuj decideme elektis distraĵon en sia ĉiutagaĵo kaj nutradon de siaj adoleskaj songoj.

Temis pri rekta ribelado, neniam spertita.

La du knabinoj malaperis el la institucio. Ilia aŭdaco stampis ilian volon kontraŭstari premojn kaj kapti proprajn kontentiĝojn. Paŭlina kaj Mari-Lu montris kapablon organizi sian vivon. Sukces-plenumo de propra vivo jam junulece!



22 junio 1940

Armistico

Okupado de Francio

Submetigo

REHEJMIĜO

1940. La rifuĝintoj de Royan retroveturis

hejmen, en Lorenon, en landon aneksita de la nazi-reĝimo: Zorgoplenaj travivaĵoj atendis la familion.

Armand Hubert

Dum deĵorado en la vilaĝo de la libroj Fontenoy-la-Joute kun niaj gesamideanoj de la Nancy-a grupo, mi uzis paŭzon por viziti antikvaĵiston lokan, kiun indikis al mi nia samideano Jacques HERLÉ. Kaj jesja, mi trovis tie serion da poŝtkartoj, kiuj portretas karikature famajn, ofte francajn esperantistojn, sed ne nur ilin. Tiujn poŝtkartojn (desegnoj de Jean Robert) mi retrovis en iuj priaj artikoloj ĉe Vikipedio. Jen kelkaj informoj – laŭ Vikipedio – pri Karl von FRENCKEL – laŭ VIKIPEDIO: FRENCKELL, finndevana germana esperantisto. E. L.


Karl von FRENCKEL (L) (1880 – 1952)

Karl von FRENCKEL (1880 – 1952) estis finna esperantisto, kiu loĝis en Germanio. Li estis konsulo de Finnlando, diplomata inĝeniero kaj bankisto. Li studis en la Teknika Universitato de Dresdeno. En 1904 aŭ 1905 li geedziĝis kun la operkantistino Minnie Nast (1874- 1956). Ekde 1908 li laboris en Bankhaus Gebrüder Arnhold, la banko de Max Arnhold kaj de la esperantisto Georg Arnhold.

En Germana Esperantisto n°2, 1912, paĝo 45, li informas pri la avantaĝoj de Ĉekbanko Esperantista, fondita en Londono. La Bankhaus Gebrüder Arnhold, en Dresdeno, akceptas monon de germanaj esperantistoj kaj transdonas sen apartaj kromkostoj.

Karl von FRENCKELL estis dumviva membro de UEA. En 1908 li fariĝis estrarano de Saksa Esperanto-Instituto. De 1909 ĝis 1919 li estis prezidanto de la Esperanto-societo en Dresdeno. Dum jaroj li estis afergvidanta sekretario de Germana Esperanto-Asocio. Ambaŭ societojn li kondukis tre lerte kaj diplomate tra multaj krizoj. Li estis prezidanto de la 14-a Universala Kongreso de Esperanto (1922) en Helsinko. En 1911 kaj 1921 li aranĝis internaciajn antaŭkongresojn en Dresdeno. Li eldonis la gazeton Dresdenaj Esperanto-sciigoj. Li ankaŭ propagandis Esperanton inter Rotarianoj.

Post la Dua Mondmilito Karl von FRENCKELL loĝis en Kronberg im Taunus.



Aŭskulteblaj voĉoj en Esperanto per tiuj podkasto


En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova epizodo de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

- KP172 Tutmondaj voĉoj - Organizo kiu donas voĉon al minoritatoj en la tuta mondo
- KP173 Lingvoinstruado - Kiel lingvoinstruado povas helpi kaj malhelpi la lingvolernadon

Pliaj epizodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://kern.punkto.info/arkivo/>
Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <https://kern.punkto.info/tuje/>
Neregule aperas la epizodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

- MvP022 uea.facila - Retejo en facila lingvo
-

Pliajn epizodojn vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>
Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje/>
Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.



Respekto kaj respondeco al la vivo Aperis libro en franca *Respect et responsabilité pour la vie*, “Respekto kaj respondeco al la vivo”, koncerne gravajn tekstojn de Albert Schweitzer (1875-1965), kiu estis kuracisto, pastro kaj protestanta teologo kaj alzaca filozofo. Nobelopremio pri paco en 1952, li estas konsiderata pioniro de humanisma agado, ekologio, antispecismo kaj nuklea malarmado.

“Mi estas vivo, kiu volas vivi, ĉirkaŭita de vivo, kiu volas vivi. “Antaŭulo de ekologio, Albert Schweitzer estis la unua, kiu uzis la formulon “respekto al la vivo” por fondi etikon, kiun li deziris esti elementa kaj universala. Respekto al nia propra vivo kaj tiu de aliaj estas du aferoj absolute nedisigeblaj, tia estas la konsciigo, kiu devus esti klara kaj tuj evidenta por ni ĉiuj.

Theodore Monod prezentis sian amikon D-ro Albert Schweitzer, “alterne muzikisto, teologo, pensulo kaj kuracisto”, kiel “unu el tiuj viroj, kiuj hodiaŭ ankoraŭ malhelpas tute malesperi pri la homaro”.

Por la unua fojo, la fundamentaj tekstoj de Albert Schweitzer estas kolektitaj en verko, kiu malkaŝas lian vizian ekologian penson. Jean-Paul Sorg, filozofo, profesoro, verkisto kaj fakisto pri Albert Schweitzer, elektis kaj enkondukis la tekstojn por tiu libro kaj prinotis ilin.

Jen kelkaj citaĵoj kaj komentoj el la libro:

La obeo al la imperativo de respekto al la vivo restas la plej saĝa el la elektoj, la plej saĝa el la etikoj, la plej bona maniero plenigi la tempon de sia vivo.

Kiel se oni ne povus kaj kiel antaŭ la nunaj urĝoj oni ne devus engaĝiĝi samtempe por la respekto ĉiam de la homaj rajtoj, por la digno de la homoj kaj por la respekto al la naturo, do al la vivantoj kaj de iliaj medioj kaj elementoj de vivo, kies homaro fariĝis la respondeca gardisto. Tiel estas, tio estas la historio.

La homo perdis la kapablecon antaŭvidi kaj averti. Fine li detruos la Teron. Sed Albert Schweitzer batalis en si mem kontraŭ la pesimismo de la scio skribante en siaj lastaj leteroj “la etiko de la respekto al la vivo komenciĝas eniri la konsciojn kaj esti instruita en la lernejoj”.

Kun la respekto al la vivo mi tenis la radikon de la problemo. Mi vidis ĝun ekde tiu momento kiel etika koncepto de la mondo, jesante al la vivo kaj inspirante la valorojn de la civilizo, mi trovis la fundojn en la


penso.

La respekto al la vivo, kiu estas la principo la plej alta, kiun nia spirito povus starigi vidalvide al la universo, tiam koncentriĝas en la senkondiĉa respekto por la homo, kia li estas kaj por la homaro en ĝia tuto. Tiu nenion komprenas el la signifo de la ekzisto, kiu ne estas denove penetrata per la konscio de la mistera kaj grandega valoro de ĉiu ekzisto kaj per la fina espero en la estonto de la homaro, malgraŭ ĉiuj signoj, kiuj inkludas nin al la dubo. Neniu societo povas plenigi siajn verajn devigojn se la individuoj, kiuj komponas ĝin, ne estas animitaj de la necesa sento respekti la homaron kaj ĉiun homan estulon.

Esti humana ne signifas esti sentimentala. La humana sento ne baziĝas sur la korinklino, sed devenas de la penso, kiam ĝi racie estigas la ideojn de kompato kaj humaneco.

La naŭa ĉapitro de la libro aperigas la tekston “Alvoko al la homaro” (1964). En ĝi Schweitzer iamaniere sentigas, ke temas pri ia testamento skribita en la timo de “ebla fino de la homaro”. Jen eta parto de tiu teksto: Mi ĉiam provis dum mia vivo konservi junan freŝecon en miaj pensoj kaj sentoj kaj, surbaze de mia sperto konsiderante la realaĵojn, mi provis plifortigi mian fidon en bonkoreco kaj neceso de vero. En nia tempo, kiam la regado de perforto kaŝiĝas malantaŭ mensogoj kaj determinas la fluon de la mondo kiel neniam antaŭe, mi restas konvinkita, tamen, ke la vero, la spirito de paco kaj amo, mildeco kaj bonkoreco estas fortoj, kiuj superas ĉian potencon. La morgaŭa mondo apartenos al tiuj virtoj, se estas sufiĉe da homoj, kiuj ĝin trapenetas per penso kaj vivas laŭe. Aperas ankaŭ fine de la libro leteroj de Albert Schweitzer. Jen tiu letero sendita de Lambarene, la 10-an de majo 1963 al D-ro Karl Jaspers (Bazelo): Tre estimata profesoro, Mi ne povas reteni min skribi al vi por esprimi la bonegan impreson, kiun faris al mi via artikolo “Ĉu ni vere estas informitaj?” Vi tuŝis la radikon mem de ĉi tiu malsana indiferenteco, al kiu la homoj de nia tempo sin fordonas. Informita publika opinio ne povas formiĝi, ĉar ni ne vere kapablas konscii pri kio okazas. Ni estas tenataj en la mallumo. Ni lernas nenion el kio okazas kaj intrigas en la kulisoj. Vi devas havi la tempon kaj volon interesiĝi pri la evoluo de la mondo kaj sukcesi akiri preskaŭ objektivan opinion. La gazetaro fariĝis potenco en si mem, kvankam ĝi ne kapablas informi nin laŭ la vero. Gravas, ke iu kiel vi traktis tiun aferon pri la vereco de la informoj, kiujn oni bonvolas doni al ni. Kun miaj plej bonaj pensoj, via sindonema Albert Schweitzer. Komunas al ni esti ambaŭ kuracisto kaj pensulo, kaj ne toleri la atombombon.

Prezentis kaj tradukis: Bernard Behra



ESPERANTO-NANCY-54 kaj

esperanto

France-Est

en amikaj rilatoj kun **BAVELO**
invitas vin al la :

87a Regiona Staĝo de Esperanto la 27/28/29ajn de marto 2020
en Centre de Loisirs d'Art-Sur-Meurthe
36 avenue de la Chartreuse, FR-54510 ART SUR MEURTHE
(N.48.66217° E.6.25104°)

Nia ĉi-jara regiona staĝo denove okazos ĉijare en tiu verda kaj trankvila distrocentro je dek kilometroj de la koro de Nancio. Meze de 11-hektara parko proksima de rivero Meurthe, ni disponas je unu el la 6 konstruaĵoj por laŭplaĉe lerni, babili, ridi, aŭskulti prelegojn, ĝui kantan spektaklon, rigardi farmbestojn ... aŭ trafoliumi la 700 titolojn de nia libroservo! Ni ankaŭ povos manĝi kaj dormi surloke kaj turismi en la ĉirkaŭaĵo.

Petro Chrdle, fondinto de Kava Pech, venos de Prago por prezenti al ni la librojn de sia eldonejo, priskribi la vivojn de Bertha Von Suttner kaj Francisko Vladimiro Lorenz kaj malkovrigi la turismajn kuriozaĵojn de Ĉeĥio.

Kjara, el Italio, kantos por ni dum la sabata vespera spektaklo,

Sabaton matene, ni vizitos en Saint Nicolas de Port la Muzeon pri kino kaj fotografio: de la pratempo ĝis nuna cifereca tekniko, sur pli ol 1000m², 3000 objektoj aperos al ni, kaj ni eĉ povos lude eksperimentumi!



Por atingi C.L.A.M. el la staci-domo de Nancy, uzu la buson de linio 20, kaj eliru ĉe la haltejo "Repentir"

Provizora Programo:

Vendrede 27-an de marto 2020

- 17a Akcepto de unuaj alvenantoj
- 19a Vespermanĝo
- 20a Interkona vespero. Por la interesatoj: ebleco viziti la centron de Nancio.

Sabate 28-an de marto 2020

- 8a ĝis 9a Matenmanĝo
- 9a Vizito al la Muzeo pri kino kaj foto en Saint Nicolas de Port
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj
- 14a15/14a45 Prezento de la novaj libroj de la Libroservo
- 15a/18a Kursoj A, B, D- prelego de Petro Chrdle pri Kava Pech, Bertha Von Suttner, F.V. Lorenz.
- 18a libroservo
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Koncerto de Kjara Raggi
- Knjapo

Dimanĉe 29-an de marto 2020

- 8a ĝis 9a Matenmanĝo
- 9a /10a30 Kursoj A, B, D: daŭrigo de la prelego de Petro Chrdle: la vidindaĵoj de Ĉeĥio kaj la Esperanto-muzeo de Svitavy.
- 10a30/12a Daŭrigo de la kursoj A kaj B, D; buntaj prezentoj
- 12a30 Tagmanĝo
- 14a Fino de la staĝo (eble kunveneto de la komitato de Esperanto France-Est.)

KURSOJ

A: Komencantoj (débutants)

Catherine Hel.

B: Paroliga kurso

Edmond Ludwig

D: Prelegoj:

Petro Chrdle pri libroj de la eldonejo Kava Pech, Berthe Von Suttner, F.V. Lorenz, turismaj vidindaĵoj en Ĉeĥio



Por pliaj informoj :
esperanto-nancy-54@laposte.net
tel. 00 33-(0)6.77.90.49.61 (Jean-Luc Thibias)
Daŭre aktualigitaj informoj ĉe:
http://esperanto.france.est.free.fr



La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.

Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

Atentu: la nombro de disponeblaj litoj estas limigita: la unuaj respondintoj estos la unuaj servitaj. Se ne plu estos litoj en dulita ĉambro, eble povos esti proponita lito en plur-lita ĉambro, aŭ necesos trovi ĉambron en proksima hotelo .

ALIĜOJ			
		1 lito por unu nokto en du-lita ĉambro: (1)	17 €
Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio	25 €	Matenmanĝo:	4 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio	43 €	Tag- aŭ vesper-manĝo sen trinkaĵo (eblas vegetarana manĝo)	10 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	20 €	1 lito por unu nokto en du-lita ĉambro + matenmanĝo (1)	21 €
Junulo inter 10 kaj 25 jaroj	12 €	duon-pensio: 1 lito por unu nokto en du-lita ĉambro + matenmanĝo + 1 manĝo sen trinkaĵo (1)	28 €
Infanoj malpli ol 10 jaroj	3 €	kompleta pensio: 1 lito en du-lita ĉambro + maten-manĝo + 2 manĝoj sen trinkaĵo (1)	36 €

(1) La centro ne disponigas tualet-tukojn, bonvolu mem kunporti ilin.

**Aliĝilo por la 87a Regiona Staĝo de Esperanto
la 27 / 28 / 29ajn de marto 2020 en ART SUR MEURTHE**

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo <small>ĉef-aliĝanto</small>	Malpli ol 25 aŭ studento	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1		kun-aliĝantoj			
2					
3					
4					

Adreso

Telefono:

Ret-adreso:

Mi preferas vegetaran manĝon (signu)

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: €

- per franca ĉeko al Esperanto Nancy 54
 per franca poŝta ĝiro al Esperanto Nancy 54 CCP 4786-82 J NANCY
 per "Sepa" ĝiro al Esperanto Nancy 54

IBAN FR49 2004 1010 1004 7868 2J03 140 BIC PSSTFRPPNCY

Aliĝantoj ekster la eŭro-zono povas pagi surloke

Krom grava evento, la aliĝ-kotizo ne estas repagebla.

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en C.L.A.M.	Vendrede 27	Sabate 28	Dimanĉe 29
Matenmanĝo			
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
1 lito en du-lita ĉambro			
Vizito al la muzeo pri kino kaj foto (4 €)			



Kjara Raggi koncertos

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

Micheline Colnot
15 rue de Lavaux
54520 LAXOU

Ĉekoj je la nomo de:

**Esperanto Nancy 54
CCP 4786-82 J NANCY**

**IBAN FR49 2004 1010 1004 7868
2J03 140 BIC PSSTFRPPNCY**

Pliaj informoj ĉe

esperanto-nancy-54@laposte.net
poŝ-tel. 00.33.(0)6.77.90.49.41

La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Nancy
Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Kjara Raggi.

Esperanto Nancy 54 estas asocio laŭ leĝo de 1901 RNA N° W543008998

Ni deziras disdoni liston de partoprenantoj al ĉiuj staĝanoj. Se vi akceptas esti sur tiu listo, ni bezonas vian konsenton. Forstreku la nevalidan deziron. Mi akceptas, ke la ĉi subaj jesaj elementoj aperu en la listo.

Subskribo:

Nomoj: jes ne	Poŝta adreso: jes ne	Ret-adreso: jes ne	Telefono: jes ne
----------------------	-----------------------------	---------------------------	-------------------------

Schweissdissi, gars qui transpire (Mulhouse)

Statue en bronze en hommage au travail. Elle représente un ouvrier terrassier qui essuie la sueur de son front, appuyé sur une pioche. Cette sculpture, réalisée en 1905 par F. Behr, est destinée au tunnel du Simplon. Après le refus des Suisses, en raison du postérieur dénudé de la statue, elle est érigée en avril 1906 place de la Réunion à Mulhouse. Après moult quolibets sur ses fesses, elle transférée en 1909 au jardin d'horticulture du Tivoli aux pieds du Rebberg, où elle se trouve toujours. Durant la Seconde Guerre mondiale, les Allemands réquisitionnent la statue, comme les grilles des parcs, pour la conduire à la fonte. Un essai pratiqué sur un doigt révèle un alliage de piètre qualité. Les nazis renoncent à leur opération.

‘s Elsässbüech, Le livre de l'Alsace, Léon Daul, p. 393

Schweisdissi, ŝvitemulo (Mulhouse)

Bronza statuo omaĝe al la laboro. Ĝi reprezentas laboriston, kiu viŝas la ŝviton el sia frunto, apogante sin sur pioĉo. Ĉi tiu skulptaĵo, farita en 1905 fare de F. Behr, estis destinita al Simplon-tunelo. Post la rifuzo de la svisoj, pro la nuda postaĵo de la statuo, ĝi estis starigita en aprilo 1906 sur la placo de la Réunion*. Post multe da ŝercadoj pri ĝiaj nudaj gluteoj, ĝi estis transigita en 1909 al la hortikultura ĝardeno de Tivoli ĉe la piedoj de Rebberg (côteau du vignoble = viteja monteto), kie ĝi ankoraŭ staras. Dum la dua mondmilito, la Germanoj postulis la statuon, same kiel la kradojn de la parkoj, por regisado. Provo farita sur fingro montris, ke la alojo estis el malbona kvalito. Feliĉe pro la rezigno de la nazioj la statuo eskapis tian detruadon.

* Réunion signifas kuniĝo. Temas pri la kunigo de Mulhouse al Francio, la 15-an de marto 1798.



La nepo: Ludoviko Kristoforo ZALESKI-ZAMENHOF, en sia 95-a jaraĝo forpasis la 9an de oktobro 2019, en Parizo.

La unua informo el la mondo kiu atingis min la 10an de oktobro 2019, estas tiu de la forpaso de la "Nepo" Ludoviko Kristoforo ZALESKI-ZAMENHOF. Tiu informo kortuŝas min. Malĝojo. Tiel estas.

La Nepo ĉiam fidelis al la verko kaj la penso de sia Avo kaj ĉiam restis ame disponebla por la Esperanto-komunumo.

Mi reprenis en miajn manojn la interparolan libron de Roman Dobrzynski, La Zamenhof-Strato, 2a eldono, kiu estas iamaniere la spirita testamento de Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof. Vidu ekzemple kelkajn el liaj paroloj:

"Mi kredas, ke sur la "pontoj de l'espero" estos pli da libera spaco por filozofoj ol en nia epoko, dominata de teknikistoj kaj ekonomiistoj. Mi kredas je la ebleco difini klare la principojn reguligantajn la homan konduton. Cetere la "pontoj de l'espero" permesos eniri la mondon, en kiu edukado certigos ekzaktan komprenon de nocioj kiel ekzemple libereco." p. 226

"Mia Avo emfazis tre forte la interkomprenigan valoron de sia verko, ne interesis lin lingvo kiel" kodo por komercistoj", sed kiel instrumento de la homa interkompreniĝo en la spirito de frateco." p. 240

"Doktoro Esperanto emfazis, ke la espero postulas ne nur aktivecon, sed ankaŭ kuraĝon, obstinon, paciencon kaj eĉ kredon." p. 263

"Ne deprimu nin malfacilaĵoj antaŭvideblaj kaj virtualaj, nek timigu malproksimeco de la celo. Sufiĉas, ke la celo estas reala kaj realigenda. Al ĝi ni orientu nian esperon." p. 263

Kondolencojn al la familio. Afablajn kaj fratecajn sentojn al la tuta komunumo.

Bernard Behra

Ni lernu per enigmoj kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

J.G.

Ĉu ankoraŭ aktuala???

El leteroj por virinaj paĝoj en 1984
Konsilo por knabinoj kun emo edziniĝi al
vegetaranoj

Ĝuste nun post 26-jara geedza vivo mi rimarkis, ke la viron viando-manĝulon eblas bonege ekkoni... en la ĝardeno, tute ne menciante viandon aŭ vegetarismon. Do, karaj junulinoj, se vi intencas edziniĝi al vegetarano kaj havas du junulojn, kiuj volas ekregi vian koron, unue esploru ilin ĝisfunde. Ili ambaŭ posedas ĝardenojn, en la du ĝardenoj meze de aliaj legomoj kreskas ankaŭ okzalaj... Eksciu, kiam ili rikoltos okzal-foliojn kaj akompanu ilin tien... La unua knabo kaptos foliojn ĉiujn - la grandajn kaj la etajn, samtempe kun herbaĉoj. Ĉion li portos hejmen, ĉar tie ja estas la patrino aŭ avino, kaj ŝi povos ĉion dispecigi. - Ĉu vi ne jam rimarkis, ke en lia koro brulas dezirego mortigi? Mortigi ĉion: plenkreskan kaj apenaŭ naskiĝintan.

La dua amiko proksimiĝas al la okzalaj malrapide, amoplene. - Li prenas foliojn nur la plej grandajn, plenkreskajn. Tiuj, kiuj apenaŭ ekĝermis, restu sur la radikoj kaj pace daŭrigu sian kreskadon. Li certe ne emas mortigi ĉion vivantan, li forŝiras nur tion, kion li bezonas por tagmanĝo... - Restas kelkaj herbaĉoj. Sed tiujn eblas ja forĵeti en la ĝardeno mem. Kial porti ilin hejmen? - ĉu vi jam divenis? La unua obstina viando-manĝulo. Li pretas ĉiupaŝe kaj ĉiuhore mortigi ĉion, kio al li malplaĉas. - La dua, fervora vegetarano, brulanta per amo al ĉiu viva estaĵo.

- Tion mi spertis... - Sed bedaŭrinde, ke li unue fariĝis mia edzo kaj nur poste la ĝardenisto!

Via amikino: Ve.Ga.

HORIZONTALE :

- Vortfunkci' esprimanta kvaliton.
- Ŝtono fragment' el la ĉielespaco. Egipita di'.
- Litera nomo. Fraŭlin'.
- Kred' je ebleco de bonaj rezultoj. Surhaŭta desegnaj'.
- INVERSE: muzika signo. INV: aervibrad'.
- Glazur'. Porkogras'.
- Ripetad' de komputa procedo.
- Part' de armeo.
- Femina sufikso. Ronĝul'. Ne pli ol.
- Prezentanta unu el la tri ordoj en la helena arkitekturo.

VERTIKALE :

- Epok' de la malnova tajlita ŝtono.
- Aparat' de varianta elektra rezistanco. Japana teatr'.
- Koro de Tero. Kartlud'.
- Plejaĝul'. Movi ŝipon.
- INV: volvi. Etendaĵ' da akvo ĉirkaŭ Venecia.
- Art' pri filmoj. Hom' kiu ne volas militojn.
- Avantaĝ'. Samsonec' de la finaj sonoj.
- Regn'. Komenco de enketo.
- Forta incitiĝo. Vicmontra numeralo.
- Planedo. Regnokodo de Turkio.

Finiĝis la lerno-tago, la juna naŭ-jara Petro pretas hejmen-iri. Tiam li aŭdas viran voĉon de staranta aŭto ĵus antaŭ la lernejo.

"Saluton knabeto, envenu...!"

Petro ŝajnigas nenion aŭdi kaj plu-paŝas sur la trotuaro. La veturilo sekvas..

"Nu, envenu, mi havas bongustan ĉokoladon....!"

Same silentas kaj indiferentas la knabo kaj eĉ plirapidigas sian paŝadon. Denove la voĉo diras:

"Ĉokolado kun aveloj ene...!"

Tiam Petro ekkuras, eniras dekstran straton... Sed vane! La veturilo akcelas kaj haltas apud la knabo...

La viro ĉe la stirilo grumbilas:

"Diru al mi, kion finfine vi deziras, ĉu eble vesperon en la cirko...?"

Tiam, Petro ĉirkaŭ-rigardas por kontroli ĉu iu rigardas, nur tiam li alparolas la viron...

"Paĉjo, jam ofte mi diris al vi, ne venu preni min antaŭ la lernejo, stirante tiun malnovan kaj aĉan aŭtomobilon....!"

SOLVO KVE 187:

HORIZONTALE: 1.ORKESTRO. 2.REL. TANKAO. 3.NAIVULA. EK. 4.APSIDI. ART. 5.METAFOR. 6.ARENA. OKON. 7.TAR. KERUBE. 8.ONOMATOPEO. 9.JT. 10.NAĜOVEZIKO.

VERTIKALE: 1.ORNAMATOJN. 2.REAPERANTA. 3.KLISTERO. 4.VIAN. MIO. 5.STUDFAKA. 6.TALIO ETNE. 7.RNA. RORO. 8.OK. KUPLI. 9.AER. OBE. 10.NOKTONEONO.

En kafejo, viro rakontas... "Lastsemajne kiam mi sidis ĉe la riverbordo, por fiŝkaptadi, mia dekjara filo akompanis min... Sed post longa tempo kaj sen sukcesa kaptado, mi konstatis, ke li ege enuis, tial mi provis kapti lian atenton per ia allogaĵo. Mi fiksis al la hoko paper-slipeton, sur kiu mi skribis la vorton "vermo"... kaj poste mi endormiĝis! KREDU MIN, kiam mi vekigis, la hokfadeno tremis... mi tiris... kaj ĉe la hoko mi trovis slipeton sur kiu estis skribite "fiŝo!"

Direktoro de uzino, malŝatata de ĉiuj siaj laboristoj, malsaniĝis kaj devis eniri hospitalon. Li ege surpriziĝis kiam vizitis lin unu el la dungitoj... Iom emociigita, li dankis; "Vi estas vere afabla, kara Ludoviko... Mi supozas, ke vi venis je la nomo de ĉiuj viaj kolegoj? - Jes, sinjoro... Okazis lotumado por selekti tiun, kiu devos viziti vin... kaj jen mi perdis!"



La patro revenas hejmen de sia laboro kaj trovas sian edzinon nervoza kaj piedumanta en la kuirejo. Grumblante ŝi konfesas; "Via fileto malbone kondukis, mi eĉ devis vangofrapi lin! - Kaj nun kie li estas? - Li kasiĝis sub sia lito!...". La patro kaŭriĝas kaj rampante alproksimiĝas al la knabeto, kiu flustre kaj komplete demandas la patron "Paĉjo, ĉu ankaŭ vin ŝi volis bati?"

Ĉevalo de farmisto malsaniĝis, tial li petas la viziton de veterinaro.

"Temas pri danĝera bakterio, kiu povus infekti ĉiujn bestojn de la stalo. Jen, uzu ĉi-tiun kuracilon! Se post tri tagoj ĝi ne efikas, tiam ni devos buĉi ĝin".

La najbara porko ĉion aŭdis kaj admonis la ĉevalon...

"Stariĝu, amiko, provu.

refortiĝi!". Sed la besto daŭre kuŝis senmove post la englutado de la kuracilo. Ankaŭ en la dua tago... La porko pli laŭte avertis lin: "Nu, stariĝu, mi certas, ke vi kapablas... Se ne, ili buĉos vin morgaŭ". Tamen en la tria tago, kiam revenis la veterinaro, kvazaŭ mirakle la ĉevalo denove staris sur siaj kvar piedoj!

Tiam la farmisto tiom ĝojis kaj ekkriis: "Mirinde, tian eventon ni kune festu! Morgaŭ mi buĉos la porkon kaj invitas vin kune festi kaj frandi!"



La gastoj ege ŝatis la fiŝon, kiun la dommastrino mem kuiris. Ŝi fieras pro tio kaj ankaŭ pro la fakto, ke ĝin kaptis la edzo frumatene. Tiam iu el la gastoj forprenas etan metal-medalon el sia telero kaj ridetas. "Hej! ŝajne okazis tute internacia familia festo por fi(ŝ)kaptado en vendejo! Sur tiu medalo mi povas legi la vorton Norvegio!"

Poemo de kolora homo (mjTHbunny)

Tradukita el la germana (Fonto: la reto)

**Kiam mi naskiĝas, mi estas nigra.
Kiam mi vekigis, mi estas nigra.
Kiam mi ne bonfartas, mi estas nigra.
Kiam mi mortas, mi estas nigra.**

**Kiam vi naskiĝas, vi estas rozkolora.
Kiam vi vekigis, vi estas blanka.
Kiam vi malbonfartas, vi estas verda.
Kiam vi frostas, vi estas blua.
Kiam vi mortas, vi estas violkolora.
Kaj vi kuraĝas nomi min kolora homo ???**



En iu restoracio eblas alvoki la kelneron aŭ kelnerinon per ĉi-tiu aparato kun la nomo "alvoko"



ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2020 ĝis 2022

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2019 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2020.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2019, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2020	2021	2022
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA 2020	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere			74 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2019 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2019, 2020				
	3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 3,80 = 15,80 eŭroj

Momerige al Roger Imbert (1938—2009)

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio) 4+1,90=5,90 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,90 = 3,40 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,90 = 3,40 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,90 = 3,40 eŭroj

Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 7,8 = 19,80 eŭroj

Konstruado-kajero de TAKE 2019

La ĉi-jara temo estas "Pavimoj" kun 9 artikoloj de diversaj aŭtoroj 6+2=8 eŭroj



El nia libroservo

Informoj



⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Art Sur Meurthe la 27/28/29ajn de marto 2020.

Ĉi-foje ni havos plezuron akcepti Petro Chrdle, fondinto de la eldonejo Kava Pech. Niaj 700 libroj kaj kasedoj atendos vin !

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est (esperanto.france.est.free.fr).

Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net




Nove alvenintaj libroj el Kava Pech



①



②



③



④

1. Esperantologio, kajero 8, esperantologiaj artikoloj, **Opo**, Kava Pech, 2018, 72 paĝoj. **9,60 €**. Oka surpapera plurlingva kajero, kiu prezentas 14 diverstemajn artikolojn rilate al esperanto.

2. La fido, Eseo, **Vinko Ošlak**, Kava Pech, 2019, 308 paĝoj. **18 €**.

Pripensoj pri la kredoj de kristano kaj liaj rilatoj kun diversaj fakoj: kulturo, scienco, lingvo...

3. Sen laco por paco, Biografio, **Petro Chdle**, Kava Pech, 2019, 162 p, **15 €**. Pri la vivo kaj verko de Berta Von Suttner, Nobelpremiitino, kies kontraŭmilita romano "For la batalilojn!" estis reeldonita de Kava Pech en 2019.

4. La afrika medicino, mirige efika, Scienco, **Yvette Pares**, Kava Pech, 2004, 200 p, **15 €**, Pri la tradiciaj medicinoj, ĝiaj aplikadoj kaj ĝiaj fakuloj.

Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 06-77-90-49-61.
- Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
 - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
 - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
 - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

Mendilo		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:




Nove alvenintaj libroj el Mondial:



①




②



③



④



⑤



⑥

1 La vundo, novelaro, **Begoña Paz**, Mondial, 2019, 84p, **9,90 €**. Rakontoj pri malagrablajoj de la vivo: soleco, malespero, rompita amrilatoj. . .

2 El ombro de l' tempo, romano, **Sten Johansson**, Mondial, 2017, 196p, **17,10 €**. Sveda verkisto renkontas kvardekjaran virinon, alportanta novaĵon, kiu resendas lin en la 70a jarojn.

3 Sensorteco, romano, **Imre Kertész**, Mondial, 2018, 216 p. **19,50 €**. Pli ol membiografie inspirita transviv-rakonto elkoncentreja: romano, kiu elmontras la kapablon de la homo adaptiĝi al cirkonstancoj, sistemoj kaj reĝimoj plej malhomaj (el-uea-katalogo).

4 La strato de Tanja, romano, **Kalle Kniiivila**, Mondial, 2017, 158 p, **11,70 €**. Rakontoj pri homoj iam loĝantaj en strato de Sankta Peterburgo de post la komenco de la 20a jarcento ĝis nun.

5 Marina ĉe la limo, romano, **Sten Johansson**, Mondial, 2018, 232 p. **17,70 €**. Marina vivas kun sia edzino Helle kaj la du adoptitaj gefiloj, Letti kaj Tom, en Malmö, granda urbo tute en la sudo de Svedio. Ili estas moderna familio, kies kunvivado minacas pluraj eventoj: personaj, emociaj, sociaj kaj eĉ politikaj. Ĉiu ano de la kvarkapa familio reagis alimaniere al la komplikiĝoj kaj danĝeroj, kaj Marina, la centra figuro de la libro, estas devigata analizi siajn rilatojn kun la tri aliaj. . . (el Mondial katalogo).

6 Ne eblas aplaŭdi unumane, Romano, **Sten Johansson**, Mondial, 2019, 82 p, **17,10 €**. Enrigardo en la vivon de homoj, kies eksteraj kaj kulturaj diferencoj ŝajnas malpli gravaj ol la homaj kvalitoj, ol la defioj de la ordinara vivo (el U. E. A. -katalogo).

***Ne eblas aplaŭdi unumane* Sten Johansson Mondial**

La svedo Sten Johansson jam aperigis dudekon da originalaĵoj en Esperanto kaj dekon da verkoj tradukitaj el la sveda. Kaj jen nova originala romaneto 157-paĝa.

La rakonto priskribas dum pluraj komencaj ĉapitroj la vivon de sveda familio kaj paralele de irana rifuĝinta familio, kies geinfanoj eklernis en svedaj lernejoj kaj plustudis sukcese en la universitato. Do entute sukcesa integriĝo en la svedan socion. Kompreneble ne ĉiam ĉio senproblemis, konfrontiĝis du vivmanieroj, du kutimoj, ankaŭ regis antaŭjuĝoj, kaj tia procedo ja interesas nin, esperantistojn, promociantojn de diversaj kulturoj ĉirkaŭ la mondo.

La fona saĝulo irana, la patro, inundas la konatojn per siaj tutpretaj proverboj, rezulto de centoj da jaroj da homkonduktaj spertoj! Kaj ne malpacienca, vi scios, kian vivsituation pentras la neebleco aplaŭdi unumane!

Pliajn saĝajn eldirojn vi trovos en la libro. Vi baldaŭ rimarkos, ke ĉiu titolo de la 20 ĉapitroj havas titolon proverban. La lasta – *Dio donu saĝon al viaj idoj, ĉar por vi jam tro malfruas* – vin lasas kompreni, ke iom post iom ne mankis la perturboj necesaj por interesa romano.

Vivre dans un pays avec trois langues officielles

Conférence Yves Nevelsteen, 15/11/2019 au Café Culture Le Gueulard, 57240 NILVANGE. Organisé par le Forum des Citoyens de Nilvange et Esperanto Thionville

Nous sommes une vingtaine dans l'assistance, espérantistes et non espérantistes.

Yves débute sa conférence à 20H30. Sur grand écran, on peut lire: "Vivi en lando kun tri oficialaj lingvoj".

Il se présente ainsi: "J'habite au nord de la Belgique, à la frontière avec la Hollande." Autrefois, diverses langues, patois et dialectes étaient parlés en Belgique: prussien, français, roman et luxembourgeois.

La frontière entre Flandre et Wallonie a beaucoup changé avec le temps. Bruxelles est une particularité qui se trouve en terre flamande mais où 80 % de la population parle français. En 1815 c'est la défaite de Waterloo. Puis au Congrès de



Vienne un nouveau pays la Hollande est créée. Pendant la 2e guerre mondiale beaucoup de flamands collaborèrent avec les nazis.

Situation actuelle:

au nord, néerlandais et flamands;

au sud, la Wallonie;

à l'est en bleu sur la carte, les

communes où l'allemand est officiel. Beaucoup de forêts. Peu de population.

Yves est un conférencier érudit qui a pu répondre à différentes questions.

Nous finissons cette soirée intéressante et instructive à 22H30

HENRY Bruno Esperanto-Thionville esperantothionville@laposte.net



Okaze de la staĝo en Art-sur-Meurthe estas planite viziti ĉi-tiun muzeon pri Kino kaj Fotoj de Saint-Nicolas-de-Port.

Ĝi prezentas amuze kaj eduke la historion kaj la uzatajn teknikojn de la komenco de foto kaj kino ĝis la novaj ciferecaj teknikoj.

Foto-galerio, projekcia ĉambro kaj malgranda butiketo kompletigas la itineron de la vizitanto.

Ŝajne estos eĉ ebleco mem lude fari iom da eksperimentoj.



Zamenhof-festo

la 14an de decembro en **MULHOUSE**

Niaj Zamenhof-festoj okazas alterne en la tri landlimaj landoj: Germanio, Svislando kaj Francio organizataj de la respektivaj grupoj de Frajburgo, de Bazelo kaj de Mulhouse.

Ĉi-jare tiun tri-landan renkontiĝon organizis la grupo de Mulhouse-Esperanto. Jacques Pineda iniciatis la organizadon en solidareca restoracio de Mulhouse kaj deziris ankaŭ doni al la gastoj la eblecon viziti la muzeojn de Mulhouse, pri arto kaj pri historio kaj la Kristnaskan bazaron.

Pro la fervoja striko ni devis elturniĝi, feliĉe niaj gastoj el Frajburgoj apenaŭ malfruetis dank'al anstataŭa aŭtobuso. Poste ni kune atingis la restoracion per tramo per rekta linio.

Male al nia tradiciaj Zamenhof-festoj, ĉi-jare ni planis kulturalan programon jam en la mateno por liberigi la posttagmezon al vizitoj.

Edmond Ludwig detale prelegis pri la urbo Mulhouse, kiu havas apartan historion rilate al Francio kaj eĉ kompare kun la cetera parto de la regiono.

Poste intervenis la geedzoj Winterhalter, kiuj klarigis kio estas solidareca restoracio. Ĝi laborigas homojn, kiuj ne sukcesas trovi laboron en la normala dungo-sistemo, samokaze ili akiras spertojn por poste pli facila integriĝo. Alia celo estas akcepti gastojn sub iu nivelo de malriĉeco por pli favorkostaj manĝoj.



Krome Roger Winterhalter estis sia-tempe urbestro de Lutterbach, kie li ankaŭ respondecis pri mondcivitana movado. Li menciis plurajn projektojn en Afriko.

Lia slogano estas: "ne gravas niaj posedaĵoj sed niaj homaj rilatoj".

Sekvis aŭkcia vendado de la libroj ricevita de Simone. Bernard esploris ilin kaj decidis pri la unua proponita prezo. Tiuj libroj estis tie metitaj sur tablo. Ili estis proponitaj tre favorpreze. Odette, Bernard kaj Andreo, prizorgis la aŭkciadon, tamen ne ĉiuj aŭkciataj libroj trovis akiranton.

Iom antaŭ la 13a la manĝo-tabloj estis jam pretaj. Ni estis 26 personoj en tute.

Dum la manĝo Jean-Luc povis jam informi pri la venonta primtempa staĝo en Art-sur Meurthe kaj disdoni prospektojn.



Post la tagmanĝo Andreo donis rendezuon ĉe la tramo-haltejo, por veturi al la urbo-centro. Pluraj kunveturis, sed tamen iuj preferis jam hejmen-veturi. Jen ni atingis la Kristnasko-bazon.

Ĉe la historia muzeo eblis vidi la klaĉo-ŝtonon, pri kiu parolis Edmond matene. Jen la taŭga loko por doni rendezuon je la 17a30 por poste veturi al la stacidomo aŭ al la parkejo ĉe la restoracio.

Ĝis tiam ĉiuj estis liberaj por viziti la historian muzeon, la koncerton en la templo kaj la Krisnasko-bazon mem. Tiel agrable finiĝis tiu Zamenhof-festo kun kisoj kaj dankoj.



La venonta 72a kongreso de la fervojistoj okazos en 2020 en Frankfurt ĉe la rivero Oder landlime al Pollando

Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020



ALIĜILO

por la 72-a kongreso de IFEF
29-a de Majo ĝis 5-a de Junio 2020
Frankfurt (Oder), Germanio
Słubice, Pollando

Retadreso por aliĝiloj:
ifk.aligho@esperanto.de

LKK-adreso: BSW-Ortsstelle Werk Kassel
Freizeitgruppe Esperanto
Frasenweg 20-36
DE-34128 Kassel (Germanio)

Kongresa retpaĝo: <http://www.ifef.net>

La kompleta programo kaj la aliĝilo estas elŝutebla de nia retejo:

<http://esperanto.france.est.free.fr>

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2020

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

29an de Februaro- 7an de Marto 2020

Informoj kaj aliĝoj :

- **Monique Prezioso**, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88
- **Christine Graissaguel**, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

ALIĜILO AL M.E.S. 2020

MEDITERANEA ESPERANTA SEMAJNO - SAINT-RAPHAËL - FRANCI

NOMO de la 1a partoprenanto: Naskiĝdato.....

NOMO de la 2a partoprenanto: Naskiĝdato.....

NOMO de la 3a partoprenanto: Naskiĝdato.....

Adreso :

Tel. : Retadreso :



► Mi partoprenos de la 29a de Februaro ĝis la 7a de Marto 2020 : jes ne
Sendu al Christine Graissaguel (vidu adreson ĉi-supre)

ĜENERALAJ INFORMOJ

Alveno : De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo **Le Val d'Esquière Les Issambres**, aŭ per taksio.

Akcepto : sabaton la 29an de Februaro - 15:00 **Fermo :** sabaton la 7an de Marto - 14:00 (post la tagmanĝo).

Kurs-horaroj : 9:00-12:00 kaj 18:00-19:00

Partopreno en kursoj (4-nivelaj) : Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.

Nomo/persona nomo	Kursniveleoj	Kursgvidantoj	Niveleoj
	1	Christine GRAISSAGUEL	Vera komencanto
	2	Elisabeth LE DRU	Komenc-parolanto
	3	Pavla DVORAKOVA	Progres-parolanto
	4	Mikaelo BRONŝTEJN	Diskuto/analizo

Liberaj posttagmezoj por : bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.

Ne forgesu viajn marŝo-ŝuojn por pied-ekskursi sur montetaro.

Distraj vesperoj far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp. Eblas bankuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.

ALIĜKOTIZO (ne repagebla) kaj LOĜADO

Plenkreskulo : 60 € Paro : 100 €

(senpaga por la malpli ol 18-jaraĝuloj)

Kompleta semajna restado (plenkreskulo) : x 360 € = €

Rabatebleco por infano (bv informiĝi) : x € = €

Suplemento por unulita ĉambro : x 110 € = €

Popersona suplemento por ĉambro almara : x 70 € = €

KURS-NIVELO

Mi partoprenos la kursaron : 1 2 3 4

Mi volas mem partopreni en programo per :

ALVENO

Trajne (St Raphaël) Fluge (Nico) Memveture

RESUMPAGO

Aliĝkotizo €

Restado €

Tuta sumo €

Sumo pagebla :

- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël", sendota kun aliĝilo al:

Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)

- aŭ **per bankoĝiro** al :

Société Marseillaise de Crédit

IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980 0020 041

BIC: SMCTFR2A ESPERANTO-CLUB- 83700 ST RAPHAEL



VOJAĜO AL KARTVELIO 2020 RENKONTO AL RIĈA NATURO KAJ LONGTEMPA KULTURO

DATO: de la 8a de aŭgusto (sabate) ĝis la 23a de aŭgusto (dimanĉe)

Unua semajno

La 8-an de aŭgusto (sabate) – La ĉefurbo Tbiliso

Matene : alveno frue matene kaj ripozo en la hotelo
Posttagmeze : vizito al la malnova kvartalo de la ĉefurbo Tbiliso kaj la supra fortikaĵo Narikala

La 9-an de aŭgusto (dimanĉe) – La urbo Mĉeta kaj la regiono Kazbegi

Matene : malkovro de la malnova ĉefurbo de Kartvelio Mĉeta
Posttagmeze : irado al la regiono Kazbegi, vizito al la preĝejo Gergeti

La 10-an de aŭgusto (lunde) – La montara regiono Kazbegi

Malkovro de la regiono : naturo (akvofaloj,...), malnova ekstera juĝejo, fortikaĵoj

La 11-an de aŭgusto (marde) – La urboj Gori kaj Kutaisi

Halto survoje en la urbo Gori (fortreso aŭ naskiĝdomo de Stalin laŭdezire)
Alveno en la urbo Kutaisi kaj vizito al la malnova parto kaj la katedralo Bagrati

La 12-an de aŭgusto (merkrede) – La Prometeo-kaverno kaj la akademio de Gelati

Matene : vizito al la kavernoj de Prometeo
Posttagmeze : vizito al la monaĥa akademio de Gelati

La 13-an de aŭgusto (ĵaude) – La regiono Svaneti, la granda Kaŭkazo

Matene : irado tra kaŭkazaj montaroj, vizito al la altnivela montara vilaĝo (2200 m) Uŝguli kun ĝiaj tipaj loĝturoj kaj alproksimiĝo de la glaĉero Ŝrara
Posttagmeze : vizito al la "amoturo" kaj alveno en la ĉefurbo de la regiono Mestia

La 14-an de aŭgusto (vendrede) – La regiono Svaneti, Mestia kaj apuda naturo

Matene ĝis posttagmeze : malkovro de la naturo apud Mestia
Posttagmeze kaj vespere : vizito al la urba muzeo kaj de la urbo nokte kun ĝiaj tipaj familituloj

La 15-an de aŭgusto (sabate) – Kanjono de Martvili, vinkelo, kaj la nigra maro

Matene : foriro el la regiono Svaneti kaj malkovro de la kanjono de Martvili
Posttagmeze : vizito al la vinkelo Salhino kun gustumado kaj alveno en la marbordan urbon Ureki

La 16-an de aŭgusto (dimanĉe) – Nigra maro : La urbo Batumi

Matene : marŝado en la granda botanika ĝardeno proksime de la marbordo
Posttagmeze : vizito al la marbordo de Batumi, la ĉefurbo de la regiono Adjara, naĝado laŭdezire

Dua semajno

La 17-an de aŭgusto (lunde) – Nigra maro : La urbo Batumi kaj la antikva fortikaĵo Gonio

Matene : vizito al antikva fortikaĵo Gonio kaj ĝia muzeo apud la turka limo
Posttagmeze : libera tempo en Batumi (naĝado, vizitoj laŭdezire)

La 18-an de aŭgusto (marde) – Malgranda kaŭkazo kaj fortresego Rabati

Matene : irado al la urbo Aĥaltsiĥe tra la malgranda kaŭkazo
Posttagmeze : vizito al la tute renovigita fortresego de Rabati en la urbo Aĥaltsiĥe

La 19-an de aŭgusto (merkrede) – Troglodita urbo Vardzia kaj la urbo Borĝomi

Matene : vizito al la troglodita urba komplekso Vardzia
Posttagmeze : irado al la urbo Borĝomi, vizito al la parko de la termostacio, supreniro per telfero

La 20-an de aŭgusto (ĵaude) - Nacia naturparko de Borĝomi

Tuttago : unutaga ekskurso, kun gvidisto, de la nacia naturparko apud Borĝomi

La 21-an de aŭgusto (vendrede) – Urbo Gori kaj Tbiliso

Matene : vizito al la antikva troglodita urbo Upliscire
Posttagmeze : reveno en Tbilison

La 22-an de aŭgusto (sabate) – Tbiliso

Libera tago por tiuj kiuj deziros
Malkovro de tipa bazaro por ĝui la lokan etoson kaj aĉeti tipajn specialaĵojn
Vizitado al la nacia muzeo
Adiaŭa vespermanĝo en la restoracio kiu superas la urbon

La 23-an de aŭgusto (dimanĉe) – Reveno hejmen

Ni povos esti ĝis 20 partoprenantoj kaj vojaĝos per buseto.

La tuta programo kaj aliĝilo estas elŝuteblaj en la retejo de EFE:
<http://esperanto.france.est.free.fr> ĉe "Vojaĝo al Kartvelio"

La 25-a kongreso de Ukraina Esperanta Asocio, 60-a AMO-seminario kaj la konferenco de ukraina sekcio de ILEI



En la ĉefurbo de Ukrainio Kijivo la 29a-30a de novembro kaj la 1-a de decembro de la jaro 2019 sukcese pasis la 25-a kongreso de Ukraina Esperanta Asocio, la 60-a AMO-seminario kaj la konferenco de ukraina sekcio de ILEI (ULEI-konferenco). Dum la kongreso la prezidanto Eŭgeno Kovtonjuk, la komisionestroj kaj la klubgvidantoj raportis pri laboro dum la pasintaj 3 jaroj. Estis elektitaj nova prezidanto de Asocio – Ihor Glagolevskij kaj novaj estraranoj, preparolitaj ĉefaj direktoj de la agado.

Enkadre de la 25-a kongreso okazis la 60-a AMO-seminario kun la temo “Movada fortigo kaj konvena rolo en Eŭropo”, kiun gvidis Stefan MacGill. La ĉeestantoj traktis la rekomendojn de la 59-a AMO-seminario en Rumanio, kiuj estos utilaj por ukraina E-movado, parolis pli aktivigo de laboro, partopreno en diversaj eŭropaj aranĝoj kaj internaciaj programoj, invito de eksterlandaj esperantistoj al Ukrainio, graveco de instruado.



Dum la konferenco de ukraina sekcio de ILEI la

estro Nina Danylyuk kaj la instruistoj raportis pri laboro dum la jaroj 2016–2019. Estis reelektita estraro (Nina Danylyuk – estro, Volodimir Hurtovenko – sekretario), kolektita la kotizo por la jaro 2020. Okazis prelegoj de Nina Danylyuk pri sciencaj studoj de E kaj instru-metodikaj materialoj en Ukrainio, de Stefan MacGill pri instruado de E-verboj, de Volodimir Soroka pri la muzika aŭtora programo de E-instruado “Septima”, de Oleksandr Hriščenko pri lia E-lernolibro, la fotorakonto pri la 52-a Kongreso de ILEI en Serbio (13–20.07. 2019).

Dankon al eks-prezidanto Eŭgeno Kovtonjuk pro bona laboro kaj multaj iniciatoj por aktivigi nian E-movadon, al la organiza teamo pro kvalite preparita kongreso, komforta ejo en la Nacia biblioteko nome de Jaroslav Mudrij, amika etoso. .



Trimonata agad-raporto de ACM Benino.

Post la unua etapo pri la projekto “Volontula-Instruado de Eo en Afriko”, Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benino lanĉis alvokon por varbi sian duan volontulon, kiu deĵoros dum dek



monatoj. Nia samideano, Cyprien AGUIYA, estis akceptita inter la ricevitaj kandidatiĝoj kaj ekdeĵoris en septembro, konforme la planitan kalendaron de ACM Benino. Septembre la volontulo Cyprien, en diversaj gimnazioj, renkontis la studentojn en la universitato en Lokossa antaŭ ol gvidi kursojn. Tri gimnazioj favore akceptis la enkondukon de Esperanto en tiuj lernejoj, nome CEG Koudo, Collège la Réussite kaj le Complexe Enfants Adolescents Epanouis. En E. A. Epanoui, Esperanto estas akceptata kiel lerno-fako kaj instruadiĝas ĉiujn mardojn. En la gimnazio la Réussite, tie la kurso ne stabiligis pro la ne taŭga horaro de la lernejoj profesoroj (instruistoj). La lernejestro promesis al ni ordigi la horaron por ke la esperanto-kurso stabiligu en la gimnazio.

En la centro, la volontulo regule gvidas la kursojn merkrede kaj sabate konforme la tempon de esperanto-lernantoj. La instruado de la lingvo baldaŭ komenciĝos kun la studentoj en la loka universitato. La unua etapo de la projekto pasintjare estis subvenciita de Fernando Maia, kiu estas la motoro de la projekto.

ACM kaj Fernando multe dankas al "Esperanto-Info" kaj "Esperanto-plus", kiuj volonte subvencii la projekton je 1030€ por kovri la lu-koston kaj la viv-subvencion de la volontulo, Cyprien AGUIYA. La duono de tiu subvencio sendiĝis por ekplenumi la agadojn.

Menciindas la helpo de SAT-Amikaro kaj Leif Nordenstorn materiale por facile plenumi la instruadon. Cyprien estas organizanta la Zamenhof-tagon, kiu okazos la 18an de decembro.



Raportis François Hounsounou, La fondinto de ACM- Benino.



106a Japana Esperanto-kongreso en Saitama

La 8-a Komuna Staĝo de jeonnam-buk K.E.A

Koreaj Esperanto-renkontiĝo



Aŭtuna pejzaĝo tra la vitejoj en Alzaco



Nov-jaraj bondeziroj de Odette kaj Bernard



G. Ratkoff.

Akvarelo reproduktita kun la afabla permeso de S-ro Georges RATKOFF.

*La mondo estas granda domo,
kie oni devus povi vivi kune
en la ĝojo, la feliĉo kaj la paco.
Se estas nokto, oni povas meti lumon.
Se malvarmas, oni povas krei varmon.
Oni povas decidi preni tempon
por pensi, kompreni, lerni,
por agi kaj labori por sia bono kaj la bono de ĉiuj.
Oni havas koron pli en festo, kiam oni kultivas la dankemon.
2020 estos tio, kion ni faros el ĝi.
Dankon al ĉiu pro lia peno.
Bernard kaj Odette BEHRA*